

BULTENO

de GERMANA ESPERANTA FERVOJISTA ASOCIO

Mitteilungsblatt der Vereinigung deutscher
Eisenbahner - Esperantisten im Bundesbahn - Sozialwerk



Fondita 1952

Numero 4

Septembro/Oktobro 1978



22a jarkunveno de GEFA en Bremen



Foto: M. Jaiter

La foirejo de Bremen

BREMEN

Okaze de la 22a GEFA-Jarkunveno, la 6an ĝis la 8an de Oktobro 1978

Roland antaŭ la urbdomo salutas jam de pli ol 500 jaroj la vizitantojn per rideto, en kiu speguliĝas trankvileco kaj afabla mildo; kiel decas al persono, kiu scias ĉion pri la mondo kaj la homoj.

Roland loĝas en la „bona ĉambro“ de la bremenanoj, sur la foirejo, la koro de la urbo. Valoras vojaĝi al Bremen nur por rigardi ĝin.

Juvelo estas la urbdomo; gotika konstruaĵo kun belega fasado laŭ pura Weser-renesanco. Vidalvide estas la „Schütting“, la domo de la komercistoj.

Gigante leviĝas la katedralo, la lulilo de Bremen. Fiere staras apude la Parlamenta Domo, mezpunkto de la politika vivo de tiu urbŝtato, kiu estas la plej malgranda federacia lando en Germanio. Kontraŭflanke, kontraste, viciĝas kelkaj malnovaj patriciaj domoj.

Bremen estas valora — tion jam sciis Karlo la Granda, kiu sendis la pastron Willehad, por ke li regu la novfonditan episkopujon Bremen. — Tion ankaŭ sciis antaŭ 1000 jaroj la imperiestro Otto I, kiu donis al Bremen la privilegion foiri.

Ankoraŭ ĉiam la estonteco de Bremen bazas sur la komercado, la havenoj kaj la industrio. Ĉirkaŭ 600 000 homoj loĝas en Bremen.

Kun siaj modernaj konstruaĵoj, kun siaj vendej-stratoj, teatroj, muzeoj kaj galerioj Bremen estas la kultura centro en la nordokcidenta regiono de Germanio.

Bremen estas ankaŭ urbo de turistoj, ĉar Bremen estas gastamanta urbo. Malgraŭ la vigla vivo restis atmosfero, kiu invitas al esplorpromenado tra la Böttcherstrateto, la malnova Schnoor-kvartalo, la encentra parko, la vendej-stratoj, en kiuj ofte odoras freŝ-rostita kafo.

Dum via promenado vi vidas ekzemplojn de progresiva arkitekturo; la antikva konstrumaniero troviĝas apud la moderna — kvazaŭ memkompreneble. La estonteco en Bremen efektiviĝis en formo de altstratoj, kiuj svingiĝas trans trafiknodoj. Valoras konatiĝi kun Bremen!

La Bremena Esperanto-Grupo estas feliĉa, zorgi por vi dum la

22a GEFA-Jarkunveno en Bremen.

Bonvenon!

Hg

Aus den Gruppen

Frankfurt/Main:

Für seinen Ausstellungsbeitrag zur NAPOSTA (Nationale Postwertzeichen-ausstellung), die vom 20. bis 25. 5. 1978 in Frankfurt/M durchgeführt wurde, erhielt unser Mitglied Mager, HVB Frankfurt/M die Silber-/Bronzemedaille. Zur Ausstellung wurden alle Briefmarken mit Esperanto-Motiven mit zahlreichen Sonderstempeln von Esperanto-Veranstaltungen vorgelegt. Auf der „Praga 78“ (Internationale Briefmarkenausstellung) im September 1978 wird unser Mitglied erneut vertreten sein. Wir berichteten bereits mehrfach über die Erfolge und Auszeichnungen (zuletzt im Bulteno 3/78).

Die „Bahnphilex“ in Hannover wurde von unseren Mitgliedern Barmaneter (Memmingen), Heimlich (Soltau) und Mager (Frankfurt/M) besucht. Ihre Sammlungen mit dem Thema „Esperanto“ wurden erfolgreich ausgestellt. GEFA gratuliert seinen Mitgliedern zu diesen Erfolgen.

Essen/Dortmund:

Am 27.7.1978 brachte die „Ruhr-Nachrichten“ den Inhalt eines ausführlichen Gesprächs mit unserem Mitglied Günter Bartz über die Bedeutung der Internationalen Sprache. Der Artikel, mit einem Lichtbild versehen, trägt die Überschrift „Grenzenlose Liebe zur Sprache ohne Grenzen“. Das Bekenntnis „Esperanto soll eine Hilfe sein, sich in jedem Teil der Welt auch ohne Kenntnisse der Landessprache mühelos verständigen zu können“, regte einige Leser zu positiven Zuschriften an, die am 1. 8. 1978 unter der Überschrift „Esperanto für Verhandlungen“ von der Redaktion veröffentlicht wurden. Auf dieses offene Bekenntnis dürfte auch die Möglichkeit des Beginns 2 neuer Esperanto-Anfängerkurse im Auslandsinstitut Dortmund zurückgeführt werden.

Neue Mitglieder

Wir begrüßen unser neues Mitglied Theodor Ester, Bww Herne (BD Essen), das seit dem 18. 5. 1978 unserer Vereinigung angehört.

Nekrolegoj

Jam la 6an de Januaro 1978 mortis nia longjara membro

Ernst Abt

en 5860 Iserlohn-Hemern, Scherlingstr.45

La edzino de nia membro Alfrid Lemme

Hedwig Lemme

el Ludwigshafen mortis subite kaj neatendite post nur mallonga malsano en la unuaj tagoj de Aprilo 1978.

Post mallonga grava malsano mortis la 17an de Julio 1978 nia longjara membro kaj amiko

Franz Lang, 64 jaraĝa, el Weil/Rhein, Oberbaselweg 41. Li estis ĉiam fidela kaj diligenta helpanto en la distrikta grupo. Li ne mankis de post jardekoj en jarkunvenoj kaj kongresoj.

La familianojn ni sincere kondolencas. Ni konservas al niaj geamikoj bonan memoron.

GEFA-Estraro

Köln/Schwelm:

Ni kore invitas ĉiujn amikojn partopreni al nia Esperantotago kaj aŭtunfesto sabaton, la 28an de Oktobro 1978. La festo okazos je favoro de la infanvilaĝo Bona Espero en Brazilio.

Programo:

14.30 h. Inaŭguro de la Esperantovojo en Schwelm

16.00 h. Komuna kaftrinkado en „Ev. Gemeindehaus“, Südstraße 7

18.00 h. Lumbildprelego pri Bona Espero de Elfriede Kruse el Frankfurt/M, kiu estis en Bona Espero en Junio kaj Julio 1978.

Renkontejo: ĝis la 14.15 h. ĉe la urba ŝparkaso Schwelm en la piediranto-distrikto (Fußgängerzone). Poste 5 minuta irado al la inaŭguro de la nova Esperantovojo apud la Zamenhofvojo.

La kukon por la kaftrinkado bakos niaj „Esperantovirinoj“. La kafon rikoltis la infanoj de Bona Espero mem. La kantgrupo de la societo de la Erc-montaranoj el Wuppertal volas senpage kontribui al la amuza parto de nia programo. Vespermanĝo estos havebla kaj hotelĉambroj estos mendeblaj. Bonvolu peti aliĝilon ĉe BOS Schindler, Bahnhof 5830 Schwelm. Aliĝu ĝis la 15a de Oktobro 1978.

Faka kaj ĉiutaga lingvoj

La instituto por la germana lingvo (IDS) en Mannheim aranĝis en Marto 1978 kunvenon de 250 scienculoj en- kaj eksterlandaj por interkonsiliĝi pri la problemoj de la diferencoj interfakaj kaj ĉiutagaj lingvoj (Westfalenpost n-ro 62 de 14an de Marto 1978). Ĉar ni vidas, ke la teknologiaj kaj sciencaj fakokampoj pli kaj pli memstariĝas pro siaj progresaj kaj ekspansiaj tendencoj. Tiu evoluo influas la proporciojn inter la ordinara kaj la multaj faklingvoj. Tio estas tre grava okazado en ĉiuj lingvoj, almenaŭ en la pli grandaj. Do, estas dankinde, ke la mannheima instituto volas fari kontribon al tiu problemoj eldonante „novan, grandan, interdisciplinan vortaron de la germana lingvo“, kiu atendeble havos vere atentindan amplekson de 20 volumoj. Raporto kun detalaj ne aperis, ĉar certaj kondiĉoj por komenci la laboron estas ankoraŭ ne klarigitaj, nome la financado. Similaj institutoj, cetere, aktivas en Francio kaj Britio, ankaŭ en orienta Berlino. La laboroj estus signifaj ankaŭ por la uzo internacia helpingo. Malhelpi aŭ almenaŭ malpliigi la daŭrantan disevoluadon inter la ordinara kaj la ĉiam pli da fakaj lingvoj utilus ankaŭ la interlingvo. La evoluo devas esti observata.

El „Interlingvistika informo servo“
n-ro 2/1978

Reaperis la „perdita“ poemaro de Kalocsay

Universala Esperanto-Asocio aperigis belan faksimilan represon de la „perdita“ poemaro de K. Kalocsay, „Izolo“. La libro havas unikan historion. Kiel tion rakontas William Auld en la antaŭparolo, la unua eldono de tiu volumo, kiun abortigis la militeksplodo en 1939, estis praktike kvineksplora! Ĉi tiu fotorepreko, farita laŭ unu el tiuj raraj originalaj ekzempleroj, havebligas unuafoje al la Esperanta publiko parton de la heredaĵo de ĝia plej granda poeto. Dum preskaŭ duonjarcento la originala poezio de Kalocsay reprezentigis esence nur per „Streĉita kordo“. Nun, fine, „Izolo“ prenan sian lokon apud ĝi. Eld. Universala Esperanto-Asocio, Rotterdam 1977, 77 p. 18 cm. Prezo: 16,50 gld., plus sendokostoj 10%. el: FERN

Redaktfino por n-ro 5/1978 estas la 10. 11. 1978

Turisma vagonaro

Lastatempe, aperis bela verda vagonaro sur la fervojo de Pekino ĝis Badaling en norda antaŭurbo de Pekino. La vagonaro estas speciale instalita de la ĉina fervoja departemento por eksterlandaj turistoj, ĉinaj elmigrintoj kaj niaj samlandanoj el Hongkongo kaj Aŭmen kiuj volas viziti la Grandan Muron. Ĝi ekfunkciis en la unua de Aprilo kaj ĉiutage transportas centojn da turistoj. Nur du horoj estas bezonataj por vojaĝo de Pekino ĝis la Granda Muro. Antaŭe oni kutimis viziti la Grandan Muron per aŭtobuso.

Nun ankaŭ Ŝanhajo, Nankino, Suĝoŭ, Vuhi, Hangĝoŭ, Fuĝoŭ, Gujlin, Ŝaŝan kaj aliaj urboj kun pitoreskaj pejzaĝoj kaj vizitindejoj preparas por funkciigi specialajn turismajn vagonarojn.

El „Popla Ĉinio“, Heft 7/78

La jarkunveno de FFEA

(Franca Fervojista Esperanto Asocio) okazos la 14an ĝis 15an de Oktobro 1978 sub aŭspicioj de UAICF kaj IFEF-aŭtoritatoj.

Resuman programon:

- Loĝado en hoteloj, — Akceptejoj, kunvenejoj, tagmanĝoj, vespera bankedo en „FOYER de CHATEAU-LANDON“, 7A, Boulevard de la Chapelle — 75010 - Paris - metro Stalingrad.
- Teatraĵo en Esperanto sabate; tuttaga ekskurso dimanĉe en suda regiono de Parizo kun promenado per vaporfervojo.

Aliĝiloj kun ĉiuj detaloj mendu al:

Guy Delaquaize — IFEF-redaktoro — responsulo de la Pariza Grupo — 52, rue Louis Gandillet, CARRIERES sur Seine 78420.

— Limdato por aliĝi: 20. 9. 1978

Merkredon, la 31an de Majo, haltis en Amsterdam-Amstelstacio iu neordinara ekspresa vagonaro, konsistanta el lokomotivo kaj nura restoracia vagono, kies interno estis ornamita per floroj. Envagoniĝis FERN-sekretario W.L. van Leeuwen kun sia edzino, s-ro E. de Rooy, distriktestro de Amsterdam kaj kelkaj kolegoj kaj amikoj venintaj por kune festadi la adiaŭon de „Chef Transport“ Van Leeuwen el la fervoja servo. En Amstelstacio la grupo metis sin sub

Per Bahn an die Große Mauer

Unlängst tauchte auf der Bahnlinie von Peking nach Badaling, einem Vorort im Norden, erstmals ein schöner grüner Zug auf, der vom chinesischen Eisenbahn-Departement eigens zum Besuch der Großen Mauer für ausländische Touristen, chinesische Auswanderer und Landsleute aus Hongkong und Amman eingerichtet wurde. Betriebsbeginn war am 1. April dieses Jahres und täglich werden seitdem hunderte von Touristen befördert. Nur zwei Stunden dauert die Bahnfahrt von Peking bis zur Großen Mauer; bislang pflegte man sie mit Bussen zu besichtigen. Jetzt wollen auch andere Städte wie Schanghai, Nanking, Sutschou, Wuhing, Hangtschou, Futschou, Gujling und Schaoschang zu landschaftlichen Schönheiten oder anderen Sehenswürdigkeiten besondere Touristikzüge einrichten.

la zorgo de trajnestro Hahné, la esperantoamiko, kiu defore akompanis la trajnon al ĝia destino Amsterdam CS. Kaj tie en la rekreacia salono Wim perdis aktivecon kaj fariĝis pacienca viktimo de multaj paroladoj, en kiuj esprimiĝis aprezo pri la kolego kaj lia longjara laboro. Enkondukis tiun torenton kolego Eisma, prezidanto de „Sporto kaj Distro“, kiu en sprita babilo faris kelkajn vortludojn pri:

Wim — Metje Ekspres. el „FERN“

El Brazilio nia IFEF-sekretario Elfriede Kruse sendis salutkarton „Al ĉiuj membroj de GEFA, precipe al tiuj, kiuj per materialo kaj ideale subtenas la agadon por **Bona Espero**, mi sendas tre karajn salutojn. Post longa vojaĝo la granda familio bonkore akceptis min. Necesas multaj laborfortoj por solvi la plej urĝajn problemojn. Ciu helpo indas kaj vere necesas. Novkonstruiĝas unu lernejo dum la infanoj ferias. Momente 5 eksterlandaj gastoj ĉeestas kaj kunhelpas, krome ĉiuj Bonesperanoj.“

Elfriede Kruse partoprenis ankaŭ la Sudamerikan Esperanto-Kongreson proksime de Sao Paulo. Intertempe ŝi revenis hejmen kaj preparas multajn diapozitivojn por la prezentado okaze de la 22a GEFA-jarkunveno en Oktobro en Bremen.

Herausgeber / eldonanto: Hauptvorstand des Bundesbahn-Sozialwerks, Frankfurt (Main). Schriftleitung / redakcio: Wilhelm Graß, 5650 Solingen 11, Meteorstraße 13. Druck / preso: Druckerei Friedrichs, 3420 Herzberg am Harz.